


# HELIKO



TRIMONATA GAZETO DE LA KOMUNUMA ESPERANTO ORGANIZAĴO RIJEKA

LA 4-a JARO - NUMERO 11, 12, 13 - MAJO, 1985.



Unomonta gazeto de la Komunuma Esperanta-organizaĵo - Rijeka  
Mjeseĉni list OK Saveza za esperanto - Rijeka

Ĉefredaktoro: Damir Rak

Gl. urednik :

Lektoro: Anja Hurĉak

Lektor :

Adresa de la redakcio: Esperantista societo  
"A.Š.Turković"  
Korzo narodne revolucije 2a/III  
51000 R I J E K A

Telefono: (051) 34-670

Presita en: Vera Hofbauer, Rijeka  
Ŝtampano u:

Kunlaboris: Rado Ŝkalamera, Lucija Borĉić, Vera Fabris,  
Sudjelovali: Valter Ŝverko, Li Yuping, Sanja Bokulić,  
Domenica Vanić, Karneluti Josip, Josip Pleadin,  
Robert Barbir, Mirjana Vukelić, Zorić Mate,  
Vanja Mušnjak

Titolpaĝo:

Naslovna stranica: VANJA MUŠNJAK

**ENHAVO:**

**PAGŬ:**

1. Internacia junulara jaro -----	1
2. Pli varia agado -----	2
3. Speciala revuo por libroamantoj -----	6
4. La Jarkunveno de "A.Š.Turković" -----	7
5. 163 poetoj -----	8
6. Prijedlog plana reda za 1985. god. -----	9
7. Financijski plan reda -----	11
8. Li Yuping estis nia gasto -----	12
9. Seminario por junulara aktivuloj -----	16
10. Robert Barbir en la Junulara Ĵurnalisma lernejo -----	17
11. Paroli, paroli, paroli -----	18
12. Esperanto parolata, kie ? -----	23
13. Unika kolektejo -----	24
14. Korespondanto de KEL -----	26
15. Pli da esperantlingva teksto -----	27
16. Nova libro -----	28
17. "Heliko" en "La abeloj" -----	29
18. Leteroj -----	30
19. Esperanto en la lernejo "Podmurvice" -----	31
20. Deziras korespondi -----	32
21. D-ro Albert Goodheir en Rijeka la 20-an de majo -----	33
22. Internacia piedirado tra Verkor Montaro -----	34
23. Kvizo pri nealiancitateco -----	35
24. 60 minutoj pri Esperanto-disaŭdigo el Radio Rijeka --	37
25. Bone informitaj dank' al nia delegito en KEL -----	44
26. EK "Juneco" en Pula planas: -----	46
27. Intervjuoj -----	47
28. Pionira Somero - Ozren -----	50
29. Esperanto en la "Enigmistika trajno '85" -----	51
30. Seminario por aktivuloj de la sociaj organizoj -----	53
31. Bildkarto el Zagreb -----	54
32. Pravila SER-a -----	55

# Internacia Junulara Jaro

Unuigintaj Nacioj deklaris la jaron 1985 Internacia Junulara Jaro. TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) esploras multajn problemojn de la hodiaŭa junularo en la mondo dum la 41-a Internacia Junulara Kongreso en Eringenfeld (FR Germanio). En nia lando la samon faros Ligo de Socialista Junularo kaj en kadro de ĝi ankaŭ nia esperantista junularo.

En sia laborplano por la jaro 1985, Kroatia Esperanto Ligo el inter ĉiuj agadoj metis en la unuan vicon du: 1) la 40-jaran jubileon de la liberiĝo de Jugoslavio kaj de la venko super faŝismo, kaj 2) Internacian Junularan Jaron (seminario por prelegantoj pri tiu ĉi temo, ekspozicio de la junulara gasetaro el 30 landoj, serio da ekspozicioj kaj prelegoj pri la junularo).

"Keliko" signas en ĉi tiu numero la Internacian Junularan Jaron sur la kovrilpaĝo per la bildo de Popola heroo Ivo Lolo Ribar (1916-1943), desegnita de nia juna kaj nova esperantistino Vanja Kušnjak. Brila figuro de Ivo Lolo Ribar estas permanenta simbolo de jugoslavia revolucia junularo; gvidinto de progresema kaj revolucia junularo restas konstanta idolo de junaj generacioj. Menciindas ke Ivo Lolo Ribar estis aktiva esperantisto. Menciinda ankaŭ ke Ivo Lolo Ribar estis forte ligita al Sušak, kie li estadis ofte dum sia infaneco kaj juneco (precipe dum someraj ferioj).

R.S.

## Pli varia agado

### Raporto de la prezidento de la Societo "A.Š.Turković" prof. Slobodan Vitolović en la jarkunveno

La jarkunveno de Esperantista societo "Aleksandar Šandor Turković" okazis la 28-an de marto 1985 en la ejo de la Komunumo de Italianoj en Rijeka. Partoprenis ĉirkaŭ 150 vizitantoj. Krom la membroj de la societo ĉeestis ankaŭ la ĥoro de la Elementa lernejo "Vladimir Gortan" kun ĝia gvidantino prof. Mirjana Žužić, plus recitadgrupo el la Elements lernejo Podmurvice kaj la gasto el Ĉinujo ĵurnalistino Li Yuping, raportistino de Radio Pekino.

Post la himno "La espero", post aliaj kantoj kaj post recitaĵoj en Esperanto, la prezidento prof. Slobodan Vitolović legis sian ĵarraporton por la periodo ekde 24.4 ĝis 28.4.85. Li diris:

-Pasintjare la agado de nia societo estis eble de unu nuanco pli varia ol antaŭe. En la plej baldaŭs estonteco tio venigebus grava levitan labor kvaliton.

Jen 15 punktoj enhavantaĵ pasintjaran laborrezultojn.

1) La kursoj por civitanoj okazigas laŭ la plano:

-la aŭtunan A-kurson komencintan en oktobro 84. gvidis Anjo Hurčak por 10 vizitantoj. Kvin el ili daŭrigas viziti la kurson.

-printempa A-kurso komenciĝis en marto 85. La gvidantino estas Sanja Bokulić; 14 vizitantoj.

-por 5 membroj de nia societo okazigis parto de B-kurso. Prelegintoj estis A. Hurčak kaj Rado Škalamera.

2) En la lernejoj:

-Elementa lernejo Bobiĵevo: 12 lernantoj el la 4. klaso. Gvidanto Damir Rak.

-Elementa lernejo Podmurvice: 12 gelernantoj el 6-a kaj

7-a klasoj. Gvidantino Mirjana Vukelić.

-Elementa lernejo "V.Gortan": Dr Marija Šekulja gvidas la 5-a klason kaj prof. S.Vitolović la 3-an klason. Kune 20 gelernantoj.

-CUO KUOIK: Rado Škalamera prelegas regule Esperanton fakultative. Komence estis 33 libervolaj gelernantoj el kvar klasoj kaj el 11 diversaj studfakoj. Nun restis dek.

-En Delnice du A-kursoj, unu en Elementa lernejo kaj dua en Mezlerneja centro. Gvidantoj: Branka Mihajlović kaj Darko Majnarić. En ĉiu grupo po ĉirkaŭ 20 gelernantoj.

En oktobro 84 japana kleriga delegacio vizitis la lernejon "V.Gortan" kaj CUO KUOIK. Naŭ membroj de tiu delegacio vizitis la klason en kiu instruas Esperanton dr Marija Šekulja. Unu lernantino bonvenigis la delegacion Esperante. La lerneja ĥoro kantis "Sub verde standardo".

3) La studado de Esperanto en Universitato Ljubljana estis inaŭgurita la 24-an de novembro 1984. Inter la unuaj 23 studentoj troviĝas unu el Rijeka: Damir Rak. Pri la inaŭguro de E-studo en Ljubljana Rado Škalamera aperigis ampleksan intervjuon kun profesoro el Budapeŝto dro Istvan Szerdahelyi en "Novi List".

4) Partopreno en fakaj kunvenoj en nia lando estis limigita pro financaj kialoj, sed tamen:

-en Bosanska Krupa, renkontiĝo de la E-junularo. ĉeestis Damir Rak,

-en Tuzla, renkontiĝo de la studenta E-junularo el BKH, ĉeestis Damir Rak,

-en Zagreb. Konsultado de studentaj kaj junularaj E-societoj el Jugoslavio, en oktobro, ĉeestis Valter Šverko,

-en Varaždin, renkontiĝo de esperantistoj kaj membroj de Ferijalni savez, en decembro, ĉeestis Valter Šverko, Robert Barbir kaj Jasna Vukmirović.

-en Split, renkontiĝo de E-junularo el Kroatio, en novembro, ĉeestis V. Šverko,

-en Slavonski Brod, la 5-a renkontiĝo de esperantistoj el Slavonio, Barjo kaj Srijem, en junio, ĉeestis Meho Jakupović.

5) Partopreno en internaciaj kunvenoj estis sufiĉe sukcesa:

-Trilanda konferenco en Treviso, 7-10.sept., -naŭ membroj el Rijeka,

-Balkana kongreso, Ateno, 20-25, okt., sep Rijekanoj,

-ILEI-konferenco en Škofja Loka en aŭgusto - du membroj el Rijeka. Poste, 21-23 aŭg. 58 partoprenintoj estadis en Rijeka. Nia societo organizis ilian estadon, vizitadon de urbo, viziton al insulo Krk kaj al Opatija,

-Kongreso de blinduloj E en Tirrenio (Italujo) 21.6.-2.7.84. partoprenis Barica Grgurević.

6) En la manifestacio "Revuo de la E-kulturo en Kumrovec", 19.5.84. partoprenis 16 gelnantoj el Elementa lernejo "V. Gortan" kaj du lernantinoj el CUC KUOIK (Branislava Subotić kaj Barbara Stanković). La ŝoron gvidis prof. Mirjana Žužić. Ĉeestis ankaŭ Meho Jakupović kaj dr Marija Šekulja.

7) Okaze de Zamenhofa tago (21.12) la societo organizis aranĝon kun prelego de dro Ivo Borovečki "Esperanto kaj internacia kunlaboro". La infanĝoro sub gvido de profesorino Žužić kantis plurajn E-kantojn. La aranĝon partoprenis ĉirkaŭ 120 vizitantoj. Poste Nado Škrlamera publikigis en du numeroj de "Novi list" longan artikolon.

8) En la kadro de soci-politike agado, pere de Koordiniga komitato de la sociaj organizoj, nia societo aktive partoprenis plenumante la junularajn agadprogramojn: en la stafeto de juneco en la marŝo sur Učka, en la seminario por aktivuloj en Fužine (Robert Barbir), kaj en la kurso "ĵurnalisma lernejo" (Robert Barbir).

9) Nia societo organizis novjaran feston en Mrzle Vodic. Partoprenis 24 anoj de SEK el Zagreb kaj 13 el Rijeka.

10) Grava okazintaĵo estis la seminario por aktivuloj de E-societoj organizita je la nomo de KEL (18-20. 1.85) en la Junulara kolonio "Lovorka Kukanić". Partoprenis 33 gejunuloj el 14 urboj el Kroatio.

Tiukaze Radio Rijeka disaŭdigis la 19-an de januaro ekde 16 ĝis 17 horoj elsendon pri seminario kaj pri E. Oni intervjuis E-veteranon Meho Jakupović kaj Rado Škalamera. La elsendo kontentige ekeŝis inter publiko, videble laŭ telefonaĵ reagoj de la aŭskultantaro. Inter aliaj, anoncis sin Đorđe Tumara, direktoro de la Elementa lernejo "V.Gortan", espriminte sian kontentecon kaj pozitivan sperton rilate la instruadon de E en kadro de liberaj agadoj.

11) El planitaj 6 ekspozicioj de la E libro, estis organizita nur unu: en Delnice (20-25.11). Ĉe la inaŭguro en la Hejmo de JKA partoprenis ĉ. 20 vizitantoj, sed poste la ekspozicion vizitis organize gelnantoj de la Elementa lernejo kaj de Mezlerneja centro. Okaze de inaŭguro Rado Škalamera parolis pri la E literaturo. Li estis ankaŭ intervjuita por elsendo de la loka radiostacio. La ekspozicio ekvokis intereson por E kaj motivigis ekkomencon de E-kurso.

12) La gazeto "Heliko" eliris en tri numeroj. Kvankam la financaj malfacilaĵoj pligrandigis, la gazeto vivas kaj konstante plibonigas. La societa prezidantaro decidis doni al la redaktaro de la gazeto pli grandan zorgon, kaj tial elektis redaktan komitaton el: Damir Pak, Rado Škalamera, Slobodan Vitolović, Valter Šverko kaj Robert Barbir.

13) En kadro de la sporta societo tre aktivas ĉi tiuj sekcioj: a) ŝakistoj - ĉ. 50 membroj. Ankaŭ ĉijare ili gajnis la unuan pozicion en la regiona ŝakligo. La gvidanto Stipe Duretić. b) tabloteniso - gvidanto Anton Sok, c) malgranda futbalo - gvidanto Anton Sok.



14) Plenumado de la laborplano por la jaro 1984.

Tiu plano enhavis 30 punktoj. Por 19 punktoj la societo ne ricevis necesan monon, tiel oni ne povis realigi ilin. Aliaj punktoj estis realigitaj aŭ entute aŭ parte. Pri tio oni sufiĉe diris en ĉi raporto. Tamen, ni ne sukcesis organizi seminarion por instruistoj, nek ĉiujn ekspoziciojn, nek eldoni planitaj ses numeroj de "Heliko". La ĉefan kialon por tiuj malsukcesoj ni vidas - diris la prezidanto - en niaj ankoraŭ malgrandaĵ subjektivaj fortoj.

15) La pasintan periodon ni povas konsideri sukcesan pro du ĉefaj kialoj:

a) la nombro de aktivaj gejunuloj konsiderinde kreskis, kaj junularo estas estonteco de ĉiu movado,

b) la propagandaj efektoj de la ekspozicioj (pasintjare kaj antaŭpasintjare), de la prelegoj, de la artikoloj en "Novi list" kaj de la elsendoj de Radio-Rijeka kreis favoran klimaton por enkonduko de E-instruado en elementajn lernejojn kaj en mezlernejajn centrojn, sed - ni ne havas sufiĉe da gvidantoj. Tial nia plejurgxa tasko estas organizi kurson por instruistoj.

#### Speciala revuo por libroamantoj

Eldonejo kaj Librejo Sonorilo eldonas dumonatan internacian revuon "Last'aperis" kun informoj pri E-libroj kaj diskoj kaj kun kulturaj tekstoj en simpla Esperanto taŭgaj por komencantoj. La prezo estas 140 belgaj frankoj kaj por eksterlandanoj 280 BF. Eldonejo kaj Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio. (El EPC) 1BF=310 malnovaj dinaroj.

# La Jarkunveno de "A.Š. Turković"

La regula jarkunveno de Kultur-arta societo de esperantistoj "A.Š.Turković" okazis la 28-an de marto 1985. en laejo de Itala komunumo en Rijeka. En la jarkunveno partoprenis 44 membroj de la societo.

La kantoro de la Elementa lernejo "Vladimir Gortan" kantis bon-nivele esperantan himnon kaj ankoraŭ kelkajn kantojn en Esperanto. Poste agrable nin surprizigis la lernantoj el la Elementa lernejo "Podmurvice", kiuj mem preparis kaj prezentis kelkajn recitaĵojn en Esperanto.

Post la enkonduka parolo de prezidanto profesoro Slobodan Vitolović, salutinte ankaŭ la gaston el Ĉinujo, raportantinon de Esperanta-sekcio de Radio Pekino Li Yaping, oni elektis la laboran prezidantaron: Mehmed Jakupović (prezidanto), Albert Desardo kaj Slobodan Vitolović.

Per unu minuto de silento oni honoris mortintajn esperantistojn la raporton pri la agado de la societo en la pasinta jaro donis Slobodan Vitolović, kaj la raporton pri la kaso Emerik Pretnar. Poste, en la diskuto pri la raportoj, unuenime konkludis ke la agado de la societo pligrandigis kaj ke aperis junaj aktivuloj. Sed, la ĉefa celo starigita en la pasintjara jarkunveno, nome amasigo kaj plijunigo de la societo pere de realigado de la laborprogramo, ne donis kontentigajn rezultojn. Tial oni decidis ke amasigo kaj plijunigo de la societo kaj konstanta plilevigado de lingva scinivelo restu pluen la prioritataj taskoj. Unu programero por provi tion realigi estos organizo de la seminario por instruistoj estontaj

Esperanto-instruist en elementaj lernejoj kaj en mezlernejoj.

La sekretario de la societo Valter Šverko proponis laborprogramon por la jaro 1985-a. La plano estis akceptita.

La ĵarkunveno konfirmis la Komisionon por la solvo de la problemo de societejoj: Vjekoslav Morankić (prezidanto), Mehmed Jakupović, Emerik Pretnar kaj Svetozar Ĉulibrk.

Kamarado Morankić eliris el la prezidantaro de la societo, ĉar li estas tro okupita profesie, kaj al lia loko venis Delfina Matijašević.

Akceptita estis ankaŭ la propono pri la plialtigo de membrokotizo. Estonte la ĵara membrokotizo estas 600 dinaroj por laboranta anaro kaj 300 por lernantoj, studentoj, pensiuloj kaj senlaboruloj.

Al prezidanto de la prezidantaro Slobodan Vitolović oni plilongigis la mandaton ĝis la sekvonta ĵarkunveno.

La ĵarkunveno konkludiĝis en la espero ke la pligrandigota agado de la societanoj rezultigos amasigon.

Valter Šverko

## 163 poetoj

"Esperanta antologio" en nova eldono, aperinta antaŭ du monatoj, entenas poemojn ekde 1887 ĝis 1981. En la volumego (900-paĝa, unu el la plej imponaj libroj en Esperanto) aperas 850 poemoj de 163 poetoj. Tiu ĉi antologio estas kolekto de la plej valoraj verkoj de la originala poezio en la Internacia Lingvo. Prezo: 60 guldenoj - 337,680 malnovaj dinaroj.

R.Š.

**PRIJEDLOG PLANA RADA  
KULTURNO UMJETNIČKOG DRUŠTVA "A.Š. TURKOVIĆ" U RIJECI  
ZA 1985. GOD.**

.....

Programskom orijentacijom, svojim ciljevima i zadacima, KUD ESPERANTISTA "A.Š. TURKOVIĆ" ostvaruje šire društvene interese jer učenje esperanta (kao pretpostavka bolje komunikacije i borbe protiv jezičnog imperijalizma) njeguje i razvija i konkretnim akcijama realizira načela nesvrstane, socijalističke, samoupravne politike Jugoslavije. Društvo "A.Š. TURKOVIĆ" je član Saveza za esperanto Hrvatske koji djeluje kao društvena organizacija i kao kolektivni član Saveza socijalističke omladine Hrvatske.

Prema zaključcima RK SSRNH Savez za esperanto Hrvatske treba da organizirano pojačava svoje organizacije i broj članova u suradnji sa društveno-političkim organizacijama na terenu, prvenstveno sa SSOH i SSRNH. U tim zaključcima ističe se potreba da se pruži poticaj i pomoć u radu te da se pravilno vrednuje i stimulira entuzijazam volontera esperantista i njihovo učešće u korisnim društvenim sadržajima. Posebno se ukazuje na ostvarivanje programske orijentacije do 1987. godine, to jest na obilježavanje 100. godišnjice esperantskog pokreta kvalitetnim, sadržajnim akcijama i manifestacijama.

Komisija za društvene organizacije RK SSOH, na sjednici održanoj 8. 11. 1983.god., zaključila je da je interes SSO da se djelatnost esperanta širi i popu arizira među mladim ljudima u svim sredinama. Jednim svojim zaključkom SSO se obavezuje na poticanje osnivanja esperantskih organizacija i na osiguravanje uvjeta za njihovo djelovanje.

**KUD ESPERANTISTA "A.Š. TURKOVIĆ" SVOJ AKCIONI PROGRAM ZA 1985. GOD  
GRADI NA SLIJEDEĆIM STRATEŠKIM ZADACIMA:**


.....

**1. TRAJNOM RIJEŠENJU PROBLEMA DRUŠTVENIH PROSTORIJA**

Koordiniranom akcijom sa OK SSOH Rijeka i to preko Koordinacionog odbora društvenih organizacija OK SSOH Rijeka, namjerava se u narednom dvogodišnjem razdoblju tra no riješiti prostorne probleme našeg Društva kao i prostorne probleme jo nekih društvenih organizacija i time omladini grada ponuditi još jedno organizirano i zanimljivo mjesto za okupljanje.

**2. ORGANIZACIJA SEMINARA ZA NASTAVNIKE I PROFESORE OSNOVNIH ŠKOLA I CENTARA USMJERENOG OBRAZOVANJA**

U suradnji sa Zavodom za prosvjetno-pedagošku službu zajednice općine Rijeka i Savezom za esperanto Hrvatske organizirati će se dva seminara, na kojima će se zainteresirani nastavnici i profesori moći potanko informirati o međunarodnom jeziku esperantu, i na taj način uz njihovu suradnju uvesti esperanto kao slobodnu aktivnost njihovih matičnih škola.



Time se pristupa realizaciji Preporuke Prosvjetnog savjeta Hrvatske te Saveznog Sekretarijata za prosvjetu i kulturu o uvođenju esperanta u osnovne i srednje škole bilo kao slobodne aktivnosti ili kao fakultativnog predmeta.

### 3. UREĐIVANJE MJESEČNOG ČASOPISA "HELIKO", kojeg uređuje omladinska novinarska sekcija društva

Ovaj društveni mjesečnik:

- a) Objavljuje sve aktualnosti vezane za rad našeg Društva i kritički se osvrće na iste.
- b) Bavi se informiranjem o razvoju i širenju esperanta na području naše regije, pa i šire.
- c) Obavještava članstvo i sve ljubitelje esperanta o predstojećim akcijama i skupovima esperantista i daje potpune informacije o istima.
- d) Daje kritičke osvrte o skupovima esperantista u našoj zemlji (kongresi, smotre, skupštine) i inozemstvu, a koje su posjetili i na njima učestvovali članovi našeg društva.
- e) Objavljuje aktualnosti vezane za društveni položaj mladih u našoj regiji.
- f) Objavljuje turističko-propagandne članke o pojedinim krajevima naše Regije.

### 4. OSNIVANJE STUDENTSKOG ESPERANTSKOG DRUŠTVA

Organizirati će se tečajevi i seminari pri fakultetima riječkog sveučilišta sa krajnjim ciljem osnivanja Studentskog esperantskog društva. K tom cilju pri Pedagoškom fakultetu je u toku formiranje prve organizirane grupe studenata esperantista u Rijeci.

### 5. AKTIVNO UZIMANJE UČEŠĆA U OBILJEŽAVANJU MEĐUNARODNE GODINE OMLADINE

U suradnji sa SEH-om koji je ispred društvenih organizacija nosilac svih manifestacija kojima će se obilježiti Međunarodna godina omladine, naše Društvo će se aktivno uključiti u obilježavanje iste putem predavanja, izložbi, susreta itd.

### 6. OBILJEŽAVANJE 40. GODIŠNJICE OSLOBODENJA NAŠE ZEMLJE

U suradnji sa OK SSOE i ostalim društvenim organizacijama uzeti puno učešće u obilježavanju predstojeće godišnjice oslobođenja (marševi, Stafeta, dani SKOJ-a, itd).

## FINANCIJSKI PLAN RADA

### KUD "A.Š.TURKOVIĆ" za 1985 g.

#### 1) RASHODI

1. Obrazovna djelatnost .....	595.000.-
2. Informativno-izdavačke djelatnosti:	
"ŠKOLSKI" (10 brojeva) .....	240.000.-
- Inicijativno sredstvo za pripremu knjige: "50 godina esperantskog pokreta u Rijeci i riječkoj Meziji .....	200.000.-
- Tehnički vladinske novinske sekcije .....	40.000.-
3. Djelatnost na polju esperantske kulture	
- Izložbe i predavanja .....	270.000.-
- Troškovi sbora, dramske i filmske sekcije .....	155.000.-
- Sudjelovanje i organizacija untra republičkog skuplja .....	700.000.-
- Sudjelovanje i organizacija untra međunarodnog skuplja .....	740.000.-
- Knjižnica (osve knjige i pretplata na časopise i novine) .....	450.000.-
- Potaknuti kao godišnjice esperanta .....	30.000.-
4. Aktivnost vezana za društveni rad	
- Sudjelovanje na OIK i obilježavanje obljetnica naše HRS-e .....	135.000.-
5. Putovanja, susreti, kongresi .....	220.000.-
6. Sredstva za trajno rješavanje problema društvenih prekretanja .....	1.000.000.-
7. Troškovi funkcioniranja delegatskog sistema .....	150.000.-
8. Administrativno-materijalni troškovi .....	220.000.-
9. Inicijativna sredstva za osnivanje Studentskog esperantskog društva .....	100.000.-
Ukupni rashodi .....	4.375.000.-

#### 2) PRIHODI

1. Uplatiti prihodi: članarini, tečajevi, predavanja, donaacije .....	400.000.-
2. Od HRS-e .....	100.000.-
3. Od Rijeke kulture .....	1.965.000.-
4. Od HRS-e osnovnog obrazovanja .....	50.000.-
5. Od izara na sreću (preko OI HRS Rijeka) .....	700.000.-
6. Od izara na sreću - lota (za trajno rješanje društvenih prekretanja) .....	1.000.000.-
7. Obiteljske organizacije OBRH iz izara na sreću za osnivanje esperantskih osnovnih organizacija .....	100.000.-
Ukupni prihodi .....	4.375.000.-

Predsjednik esperantskog društva  
(prof. Vitolević Stjepan)

# LI YUPING ESTIS NIA GASTO

## ESPERANTISTINO LAŬ ORDONO

"Novi list" ("Glas Istre"), taggazeto en Rijeka, en sia numero de 30-a de marto 85. publikigis mallongan informon sub la titolo "Novinarĉka Radio-Pekings Li Juping goŝca riĵeĉkih esperantista".

Li Yuping, ĵurnalistino, raportistino de Radio Pekino, venis en Jugoslavion laŭ la invito de KEL (Kroatia E-Ligo) por partopreni en la Dua memorkunveno "Ivan Flanĵak" en Osijek. La temo de memorkunveno estis "Esperanto en radio". Li Yuping raportis en Osijek pri "Dudek jaroj de Esperanto-elsendoj en Radio-Pekino".

Antaŭ ol veni en Osijekon, Li vizitis Subotica kaj tie ŝi estis gasto de la suboticaĵ esperantistoj. Post Osijek, ŝi vizitis Borovo kaj Zagreb. El Zagreb ŝi venis al Rijeka, kiel gasto de nia E-societo.

En Rijeka Li Yuping partoprenis en la ĵarkunveno de nia societo "A.Š.Turković". Ĉe Radio Rijeka Li Yuping partoprenis en du elsendoj: unue, en la tuja disaŭdigo kie ŝi estis intervjuita Esperante pere de tradukado far R.Škalamera kaj, due, por la elsendo "Radio-putovanĵe" rakontante pri Pekino, helpe de tradukado far Sanja Bokulić. La dua elsendo, akompanita per la ĉina muziko, daŭris 30 minutoj, estis surbendigita la 28-an de marto kaj disaŭdigita sabaton la 30-an de marto ekde 17.30 ĝis 18h.

Li Yuping estis en Rijeka gasto de familio Jakupović kaj

de familio Ŝkalamera. Oni gvidis ŝin tra la urbo, de Trsat ĝis la urba centro, kaj al "Novi list", kie ŝin intervjuis Mišo Cvijanović. En Opatija Li pasigis kelkajn horojn kune kun ŝi-tieaj esperantistoj, interkoniĝinte turismajn ecojn de nia lando. Li Yuping ricevis de nia societo memordonacon "La tabulon de Baška". Ŝi donacis al ni pluraj insignojn de Radio Pekino.

Interparolante kaj babilante oni povis multon ekscii pri E-movado en Ĉinujo, sed eble la plej interesa estis ŝia rakonto pri tio kiel ŝi mem iĝis esperantistino. Li Yuping estas nun 45-jaraĝa. Antaŭ 22 jaroj ŝi eĉ ne sciis kio estas Esperanto. Tiam ŝi studadis la kvaran jaron en la universitato en Peking la ĵurnalismon. En tiu tempo Radio Pekino decidis enkonduki regulaĵn ĉiutagaĵn elsendojn en internacia lingvo. Li Yuping estis elektita por tiu estonta nova radio-elsendado. Do ŝi devis ellerni Esperanton. Tiel okazis ke ŝi devis laŭ ordono lerni Esperanton unu jaron ĉe universitato en Pekino. Finfine la kvaran jaron de tia ĵurnalisma studo, ŝi povis ekkomenci labori ĉe Esperanta sekcio de Radio Pekino. Do, Li Yuping estas profesia ĵurnalistino, kiu profesie ĉiutage uzas Esperanton en sia laboro, jam pli ol 20 jaroj. Kune kun ŝi ĉe Radio Pekino en Esperanta sekcio laboras ankoraŭ tri esperantistinoj-ĵurnalistinoj kaj ankoraŭ kvar ĵurnalistoj-esperantistoj - entute ok ĵurnalistoj-esperantistoj. Radio Pekino elsendas Esperante kvar fojonutage, entute du horojn tage.

El Rijeka Li Yuping ekvojaĝis al Pula, kie ŝi estis gastigita de Ivo Borovečki. De Pula ŝi ekvojaĝis al Beograd kaj de tie al Pekino.



# Jugoslavenski tjedan za nezaborav

● **Novi-  
narka Ra-  
dio Pekin-  
ga Li Ju-  
ping o su-  
sretima s  
jugoslaven-  
skim espe-  
rantistima**

*Kovi list,  
11. 5. 85.*

je, studirale na fakultetu... M.  
će ubuduće opet trebati upr...  
dente na esperanto, trebalo nam  
novih stručnjaka, mi stari... u  
kore u mirovima...

Iskreno, ali ne i glasan smijeh, po-  
pratio je istinita prijava da i iz-  
gledom i godinama naša gošća Li Ju-  
ping još nije za mirovima, a onda  
poteže priču o riječkim esperantisti-  
ma. Prošle godine večeri naša se gošća  
na godišnjoj skupštini riječkih espe-  
rantista upozнала s arhivskim ve-  
toranima, utjerila koliko su iskreni  
ali još marljivo, ali i oduševila življe-  
ću i znanjem najmlađih. U Osnovnoj  
školi "Vladimir Gortan" učenički je  
zbor pod ravnanjem Mirjane Žužić  
opjevao nekoliko pjesama na espe-  
ranto...

Naučila je naša kolegica iz velike  
prijateljske naše zemlje i nauče na-  
še riječi i radostno ih izgovara na  
poticaj riječkog domaćina Skalame-  
re. Esperanto je taj u kojem je k o  
kod kuće, ali na rastanku, spome-  
nuvši s ponosom da će Peking 1986.  
godine biti domaćinom Svjetskog kon-  
gressa esperantista, ipak pozdravlja  
na našem jeziku: "Do videnja!"

MISO CVJANOVIC

Na adresu Radoslava Skala-  
mere iz Pekinga je ubr-  
zo stiglo pismo zah-  
osti  
Li Juping za gostoprim-  
stvo, za susrete u Radio  
Rijeci i "Novom listu", za  
svu pažnju jugoslavenskih  
esperantista. U pismu je i  
obavijest o terminima u  
kojima su na valovinu es-  
perantske emisije Radio-  
Pekinga izvještaji Li Ju-  
ping o posjeti Jugoslaviji  
i molba — o dojmovima i  
sugestijama.

Čeznem za ponovnim su-  
sretom sljedeće godine u  
Pekinga. Tada ću nastojati  
biti dobar ugostitelj — na-  
pisala je uz ostalo Li Ju-  
ping.

Uobičajeni podzemni koncerti pl-  
načkih strojeva prelida širok  
smijeh i već antedotalni poz-  
drav: "Veče — let!" Ingvoreni je to  
posjet. Vlasi Radoslav Skalamera,  
dugogodišnji redakcijski suradnik i  
suradnik, sada umirovljenik, vječni  
rajubijeni u esperanto, kao i pje-  
govu i jugoslavensku gošću Li Ju-  
ping, novinarka iz dalekog Pekinga.

Sa dvadeset i dvije godine Li Ju-  
ping je u Pekingu diplomirala es-  
peranto i odmah poslije studija za-  
poslika se u odjeljenju za emisije na  
esperantu Radio - Pekinga. U Jugo-  
slaviju je došla kao gošća Organizaci-  
onog komiteta Drugog memorijal-  
nog susreta "Ivan Flanjak" u Osije-  
ku, posvećena velikom osjetkom es-  
perantista, podnijevši referat o dva-  
deset godina esperanta na Radio  
Pekinga.

## ● KAO KOD KUĆE

— Prvi put sam u Jugoslaviji, a  
svuda se osjećam kao da sam kod  
kuće — prevodi mi Skalame-  
re iskrena karizmatična naša kineska  
gošća. Bila sam u Beogradu, Su-  
bottici, Osijeku, Borovu, Zagrebu, Ri-  
jeci i Puli u domovima jugoslavens-  
kih esperantista... Kao Stefela...  
Prvi put su me ti do tada nepozna-  
ni ljudi primili u svoje stanove a bilo  
mi je lijepo i ugodno kao da se go-  
dinama znamo. Uvijek su pamtili taj  
tjedan u Jugoslaviji... Jugoslavenska  
kuhinja? Iznenadit ćete se, možda,  
ali me veoma podajeća na našu, Ki-  
nesku kuhinju!

Uopće, u mnogim riječima Li Ju-  
ping, kineski prikladno i nenaciz-  
ljivo, kazuje o prijateljsku Kine i  
Jugoslavije. Ne taj da još Jugoslaviji  
i prije posjeta nije bila zemlja  
misanana, zna o brodogovinu i o ih ri-  
ječki "2. maj" grad za "100 i ki-  
neskim stručnjacima, koji godinama  
žive u Rijeci, poznate još je da neki  
naši gradovi imaju kineske restora-



JUGOSLAVENSKA JE KUHI-  
NJA SLIČNA KINESKOJ — Li  
Juping u karikaturi M. Cvija-  
novića

na, oduševljena je Uspotama Jedra-  
na, prijatelj je s dopisnicom Radio-  
Pekinga iz Jugoslavije...

## ● STO TISUĆA KINEZA ESPERANTISTA

Esperanto je, dakako, uvijek u pr-  
vom planu.

— U Kini ima gotovo sto tisuća  
esperantista, a esperanto se sve više  
uči — kazuje Li Juping. Ima mnogo  
samouka, ima dopisnih škola, a ima  
i pravih škola pri različitim sveučili-  
štima. Emisije na esperanto na Ra-  
dio-Pekinga radi ekipa od osam di-  
plomiranih novinara — esperantista,  
među kojima sam i ja. Naše su emi-  
sije slušane širom Kine, ali i širom  
svijeta pa i u Jugoslaviji. Godišnje  
primamo barem stotinu pisama od na-  
ših sugrađana iz više od pedeset re-  
giona iz svih krajeva svijeta. Rad  
mi u stvaranju naše esperantske per-  
turi da su služili našu emisiju. Es-  
peranto su uvele generacije, poput mo-

中华人民共和国  
北京广播电台

la 15-a de aprilo, 1985,

Pekino

Estimata kamarado Radoslav Škalamera,

Mi jam revenis al la patrolando kaj komencis mian rutinan laboron.

Mi ĉiam memoros mian ĝojon restadon en via aminda urbo. Mi kore dankas via  
pro via efabla gastigado kaj interesplena konigo kaj akompano. Mi des pli  
ne forgesas la intervjuon en Radio Bijeka kaj redakto de Novi List.

Dank' al via bela interpretado la afero iris glate. (Mi jam legis <sup>la</sup> ~~jurnal~~  
en Pula). Mi ŝuldas mian sukcesan vojaĝon al vi kaj aliaj karaj gesamideanoj.  
Mi sopiras la reviziigon en Pekino venontjare. Tiam mi klopodos per esti  
bona gastiganto.

Ekde la 28-a de aprilo, mi sinsekve raportas mian vojaĝon en Jugoslavio  
al niaj aŭskultantoj. Se tio interesas vin, bonvenu aŭskulti tiutempe.  
Mi estas des pli ĝoja se vi skribos al mi viajn impresojn kaj sugestojn.

Bonvenu transdoni mian sinceran saluton kaj koraŭ dankon al via estimata  
edzino.

Sanon kaj felician al vi!

Sincere via

Li Yuping

## Seminario por junulara aktivuloj

Per iniciativo de la Komisiono por junularaj demandoj de KEL, Esperanto-societo "A.Š.Turković" organizis ekde la 18-a ĝis la 20-a de junularo ĝijare Seminarion por aktivuloj en E-societoj. Ĝi okazis en Junulara kolonio "Lovorke Kukanić" kun partopreno de 33 aktivuloj el 15 urboj: Brčko, Đurđevac, Karlovec, Križevci, Kutina, Našice, Pula, Rijeka, Split, Slavonski Brod, Sisak, Valpovo, Varaždin, Vrbovec kaj Zagreb.

Prelegantoj estis: Zlatko Tišljar (direktoro de IKS), Ivica Špoljarec (ĉefredaktoro de Tempo), Darko Šubat (membro de la Prezidentaro de RK SSOH) kaj Emerik Pretner (La kasisto de nia societo).

Prilaboritaj estis ĝi tiuj temoj:

- 1) Jurprocedo kaj juraj bazoj por fondi E-societon.
- 2) Maniero de administradogvidado kaj de kasogvidado de E-societo,
- 3) Agadaspektoj de E-societo,
- 4) Maniero de financado de E-societo.
- 5) La rolo kaj la pozicio de E-societoj en SSOH kaj SSRNH,
- 6) Kunalaboro de E-societo kun aliaj sociorganizaĵoj,
- 7) La rolo kaj la pozicio de E-societo en KEL kaj JEL.
- 8) IKS kaj ĝia rolo kaj pozicio en la laboro de KEL,
- 9) Internaciaj E-organizaĵoj (UEA, TEJO, SAT, ILEI) kaj internaciaj servoj,
- 10) Internacia Junulara Jaro kaj la rolo de KEL dum ĝiaj manifestaĵoj,
- 11) La Statuto de KEL,
- 12) La rolo kaj la pozicio de junularo en la laboro de E-societoj kaj KEL kaj la publika diskuto pri la Program-propono-

no de la Komisiono por junularaj demandoj.

La provo seminarion transformi en renkontiĝon ne sukcesis, precipe pro malbela vetero. La seminarion vizitis kontentiga numero de aktivuloj. Ili per sia aktiveco konfirmendus sukceson aŭ malsukceson de la seminario.

Valter Šverko

### Robert Barbir en la Junulara ĵurnalisma lernejo

Robert Barbir, novebakita membro de nia societo "A.Š.Turković" vizitadis en la Junulara kolonio "Lovorka Kukanić" en Rijeka, ekde la 5-a de marto ĝis la 23-a de aprilo, la junularan ĵurnalisman lernejon.

Ĉi-jare estas jam la tria ciklo de la ĵurnalisma lernejo, kaj por ĝi ekzistis granda intereso ĉe junularo. La Komunuma konferenco de la Ligo de socialisma junularo (OK SSO) faris pasintjare enketon kiu montris ke unu el gravaj problemoj en labor-organizaĵoj, en la centroj de la direktita edukado kaj en la fakultatoj estas informado, ĉar la junularon kontentigas nek la maniero nek la grado de ilia informiteco. La celo de la ĵurnalisma lernejo estas kapabligi gejunulojn por ke ili kvalite envidiĝu en laboron kaj ankaŭ ke ili iniciatu eldonon de junularaj informiloj.

La lerna ciklo konsistis el 23 temoj kaj la prelegantoj estis ĵurnalistoj, publicistoj kaj soci-politikaj laborantoj. Dum la studado la lernantoj vizitis redakcion "Novi list", presejon "Liburnija" kaj radio-televidan centron en Rijeka.

# Paroli, paroli, paroli

Rakonti, konversacii, babilo, esprimi sin per vortoj, eldiri sentojn kaj pensojn elokvente, prononci Esperantajn vortojn, oratori, leŭte legi, deklami, buŝe, voĉe eniri en diskurson, ekzerci oracion, praktiki parolarton, retorikon, poluri dirmanieron, alparoli komencanton, ekparoli, elparoli, interparoli, kontraŭparoli, priparoli, reparaoli, nazparoli, pikparoli, ŝvelparoli, ventroparoli, reciti, repliki, rebati, diskuti, disputi, debati, polemiki, pritrakti, kontesti, libere kaj flue vortigi sian animataton kaj humoron - do ĉiam inter esperantistoj Esperante paroli, paroli, paroli.

Kial? Ĉu vi estas esperantisto? Laŭ la Bulonja deklaro (7. aŭg. 1905.) "esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ŝin uzas." Do, ne estas esperantisto la persono kiu ne scias kaj ne uzas Esperanton! Se vi estas esperantisto, parolu Esperanton!

Bone faris William Auld kiam li en la jaro 1968-a metis en la faman legolibron "Paŝoj al plana posedo" ankaŭ parton el Parolado en St. Petersburg (1910) far D.L.Zamenhof sub la titolo "Pri la neceso paroli Esperanton". Vidu ni kion tiam diris Zamenhof:

Vi eble miras, ke mi parolas al vi ne ruse, sed esperante, vi eble diras, ke ĉar ni havas nun kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estas multe pli nature paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas tamen gravaj kaŭzoj, pro kiuj mi elektis por mia parolo tiun lingvon, por kiu ni batalas kaj por kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukan. Esperantistoj, disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj kunvenas por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton perfekte egale ne sole en la plej malproksimaj anguloj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiuj plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo...

... Interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi honajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio.

...Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni nepre devas paroli ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto."

Tiuj vortoj de Zamenhof, eldiritaj antaŭ ĝuste 75 jaroj, estas aktualaj ankaŭ hodiaŭ. Eble ĉe pli aktualaj ol iam, ĉar en iuj rondoj hodiaŭ oni pli malbone parolas Esperanton ol antaŭ kelkaj jardekoj. Ekzemple dum la lasta kongreso de jugoslavaj esperantistoj en Ŝkofja Loka, la prezidanto de JEL eldiris la la ĉefan raporton kaj la ĉefan paroladon ne en Esperanto sed kroät-serbe!

Ankaŭ en Kutina, dum la lasta jara ĉefkunveno de K&L, oni rolis nur kroate kaj ne esperante. La samo okazis en Rijeka, dum la jara ĉefkunveno de la societo "A.Š.Turković".

Iam ne estis tiel. Antaŭ 24 jaroj, nome en la jaro 1961. kiam estis presita la libro "Reeĥoj", en antaŭparolo de tiu ĉi libro la fama verkistino Marjorie Boulton skribis, interalie:

"Jugoslaviaj esperantistoj kutime donas bonegan ekzemplon pri la prononcado de la internacia lingvo, parolas ĝin tre flue, rapide kaj tre korekte...Ili kutime parolas nur Esperanton dum siaj esperantistaj kunvenoj. (La alta nivelo de esperanta scio inter jugoslaviaj esperantistoj ekzistas grandparte pro kaŭzo tre simpla: ili kutime parolas nur Esperanton dum siaj esperantistaj kunvenoj.)"

Komparu tiun deklaron de M.Boulton kun tiuj ĉi vortoj de dr Ivo Borovečki, eldiritaj la 21-an de decembro 1984. en Rijeka dum la Zamenhofs vespero: "Dozvolite mi da ovaj put govorim hrvatski, ali kad me drugi put budete pozvali da vam dođem govoriti, govorit ću samo na esperantu...". Ĉu ni venis je tia stato ke oni devas minaci per esperanto?

Ni pritraktu ankoraŭ unu ekzemplon. La 19-an de januaro 1985. Radio-Rijeka donas al Esperanto tuthoran elsendon (de 16 ĝis 17 horoj). Samtempe en la junularkampadejo "Lovorka Kukanić" okazadis renkontiĝo de la esperantista junularo el Kroatio. Ĉar la radio-elsendo estis kontakto-elsendo, Valter Šverko, sekretario de la societo "A.Š.Turković" telefone alvokis radio-stacion por sciigi radio-auskultantaron pri la kunveno de junaj esperantistoj el la tuta Kroatio. La ĵurnalisti, gvidanto de la radio-kontakto-elsendo (Davor Travaš) volonte parolis kun Valter Šverko, sed tuj demandis se oni parolas Esperanton ĉe la kunveno. Šverko, bedaŭrinde, devis respondi: ne, sed kroate.

La demando de la ĵurnalisti estas tute memkomprenebla kaj tu-

te natura. Ĉar, se vi esperantistoj fieras ke Esperanto estas tiel  
facila (sepoble ĝis dekoble pli facila ol naciaj lingvoj), pruvu  
tion praktike, montru al ni kiel vi parolas. En la ĉefa verko de  
Ivan Mažuranić troviĝas ĉi tiuj versoj:

"Dobar pastijer, jer što kaže inom  
to sam svojim potvrđuje činom."

La versojn de Mažuranić esperantigis Mavro Špicer tiel:

"Bona pastro: kion li predikas,  
Mem per propraj faroj li efikas".

Josip Velebit tion diris ĉi tiel:

"Ĉar bonpaŝtist' ne scias nur proponi,  
sed eĉ per propra far' ekzemplon doni."

Do, esperantistoj, pruvu ke Esperanto estas facila. Kiom da  
jaroj vi estas esperantisto? Kiom longe vi jam lernas E-n? Kiel vi  
propagandas Esperanton, se vi ne scias ĝin paroli?

"Heroldo de Esperanto" de 22-a de decembro 1984. oni povas  
legi pri naturamikoj en Strasburgo: "De la 17-a ĝis la 23-a de  
septembro renkontiĝis en Strasburgo (Francio) esperantistaj natur-  
amikoj el 4 nacioj. Ili partoprenis la malferman kunsidon de la  
12-a Kongreso de la Turista Asocio "La Naturamikoj", kiu arigas  
membrojn el 14 nacioj, kaj statute agnoskas Esperanton. Tamen, la  
paroladoj okazis nur en du lingvoj - la germana kaj la franca. La  
naturamika movado, kiu naskiĝis en Vieno en 1895, estas parto de  
la laborista movado kaj de jardekoj subtenas Esperanton."

Pripensu pri la efekte: ĉu tia praktiko utilas aŭ malutilas  
al Esperanto? Kion provas iu kunveno de "esperantistoj" kie oni ne  
sudas Esperanton? "esperantistoj" sen Esperanto.

Ni citu ankoraŭ unu malgajen konstaton el la "Voĉo" 6/83 sub  
la titolo "Averte pri Esperanta movado":

"La Esperanta movado funkcias kiel armeo havanta multajn



bonajn generalojn, sed sen soldatoj. Ne ekzistas bazo en la popolo amaso....Dum 70 jaroj, ĉirkaŭ 200 personoj lernis la elementan kurson de E, sed nun nur 2 aŭ 3 personoj balbutas la lingvon. La loka klubo ekzistas nur en la papero... La sola lernado de gramatiko ne sufiĉas. Paroli lingvon oni lernas ĉefe per la aŭdado, multfoje ripetita aŭdado. Almenaŭ 2000 horoj de laŭtlegado...Oni devas ĉiutage laŭtlege almenaŭ dumunu horo la E-literaturon...Kontraŭe la E-movado restos eterne, kiel movado de komencantoj de 16 reguloj."

Tion skribis J.M., Juiz de Fora Brazilo. Ververe Esperanto estas multe pli facila lingvo ol la aliaj, sed tamen oni devas ĝin lerni kaj multe klopodi por atingi perfektecon. Tio signifas ke ni ne lasu nin ebriiĝi per la facileco, sed ke ni bone pripensu: nenion ni atingos senpene.

F. Faulhaber en sia libro "Ne tiel, sed tiel ĉi" admonas. "Ni kutimas diri ke E estas facila lingvo. Kvankam tio estas nur relativa ĝusta, ni tamen pripensu, ke ĝian facilecon ni ne provas per malsimpla aŭ tordite stilo." En alia loko li skribis: "Provi uzi la lingvon tiom intense, kiom nian gepatran lingvon postulas persistajn penadon kaj ekzercadon, por kiuj ni uzu ĉiun taŭgan okazon. Oni pripensu, ke ion valoran oni neniam akiras senpene."

"Heroldo de Esperanto" en la numero de 30-a de majo 1984. donas sub la titolo "Atentigoj al la verkemuloj" la respondon al la demando "Ĉu la lingvo estas facila?" tiel: "Nur post longaj kaj diligentaj studado kaj ekzercado oni povas esperi, ke oni atingis sufiĉan masurecon en la lingvokono kaj en la literatura metiejo".

Aldone <sup>al</sup>tiu pritakso pri facileco, ni oitu ankaŭ "Esperanton" el majo 1970: "En la nuna stadio de la klopodoj enkonduki Esperanton tro granda vortaro kaj idiotismoj estus malavantaĝo, ĉar ĝi malrepidigus la lernadon. Avantaĝo de Esperanto estas la granda elasteco kaj esprim kapablo, kiun donas ĝia unika strukturo. Tiam elastecan havas certe neniu nacia lingvo."

Do, kion fari? Ĉu insisti je lernado, legado kaj parolado, aŭ rezigni? Se oni malmulte parolas, oni ne povas bone paroli. Se oni malmulte legas gazetojn kaj librojn, oni ne povas antaŭeniri. Se iu diras ke li estas Esperantisto, demandu lin kiom li legas, kiujn revuojn, kiom da libroj li posedas.

Ĉu postuli de ĉiu esperantisto paroli Esperanton? Ĉu tio signifus esti fanatikulo, sektulo, aŭ strangulo? Ne. Male. Oni devas postuli parolkapablon de ĉiu esperantisto, por la bono de la movado, de li mem kaj por la efika propagando de neinformitaj popolamasoj.

Societaj kunvenoj povus esti la vera lernejo de E. Tie oni povus gustumi la belan paroladon, la belan interparolon. Tie oni devus enkonduki regulajn konversaciajn kunvenojn kaj bone eluzadi parolkapablojn de bonaj malnovaj Esperantistoj kaj la konsiloj el bonaj libroj: "Kiel diri..?", "Ne tiel, sed tiel ĉi" kaj "Amuzaj dialogoj"...

Paroli, paroli, paroli.

Rado Ŝkalamera

Rijeka, la 4-an de februaro 1985.

#### Esperanto parolata, kie?

Oni diras ke inter Esperantistoj ne ekzistas analfabetoj (ĉar Internacian Lingvon oni komencas lerni nur post ellerno de skribo kaj lego), sed ili estas en la plej granda parto ĉiamaj krokodiloj. Facile estas ne esti analfabeto, ĉar ĉiu havas la okazon legi kaj skribi, sed kie trovi la lokon kaj okazon paroli Esperante?

Eĉ en grandaj kunvenoj oni ne parolas sufiĉe Esperanton. Memoru la lastan kongreson en Ŝkofja Loka, aŭ la asembleon de KEL en Kutina.

Ĝstarigu ni almenaŭ unu tagon en la semajno kunvenon en la societejo kie oni nepre parolu nur Esperanton.

R.Š.

# Unika kolektejo

Kion faros homo kiu troviĝas la unuan fojon en mondkonata, pitoreska, belega kaj neforgesebla Vieno? Vieno - urbo malnova, tamen nuntempe moderna.

Ĉu komenci kun la katedralo de Sankte Stefano, kun la Imperiestra Kastelo, ĉu komenci kun la kastelo Schönbrunn aŭ ricevi la unuajn impresojn vizitante la plezurejon Prater kun ĝia Giganta Rado? Peliĉe mi havis sufiĉe da tempo - preskaŭ du monatojn antaŭ mi por plibonigi la lingvon kaj konatiĝi kun la urbo.

Mia malgranda gvidlibro anglalingve diris al mi ke ie ĉi tie, en la koro de la malnova urbokerno ekzistas ankaŭ io por ni esperantistoj - Internacia Esperanto Muzeo - "la unika ekzistanta muzeo de tiu ĉi artefarita eŭropa lingvo kun 16.000 volumoj verkitaj en Esperanto. Malfermata 9-15 h lunde, merkrede kaj vendrede."

Ho, kiel ekpulis mia trikvarone verde kolorigita koro!



WIEN - HOFBURG  
Sidejo de la  
Internacia Esperanto-Muzeo

Jen Hofburg, jen aliro de Michaelerplatz, la granda kupolo kaj sennombraj ŝtupoj (poste mi eksciis pri lifto kiu evidente malaperis en tiu krizmomento).

Kun tre afabla sinjoro kiu akceptadas vizitantojn mi travis komunan lingvon post kelkajn momentojn. Komprenoble!

La Muzeo estas vere vizitinda. Tio kion oni povas vidi ĉi tie sendube donas al esperantistoj pliajn fortojn por labori en Esperanto-movado, kaj neesperantistoj devus nepre ŝanĝi siajn obstinajn antaŭjuĝojn pri la internacia lingvo.



INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO

En la kvin grandaj salonoj (ĉirkaŭ 500 m<sup>2</sup>) ni gajnas en konstanta ekspozicio superrigardon pri disvastiĝo kaj uzebleco de la internacia lingvo. Ĉe la enirejo tuj salutas vin Zamenhofs busto ĉe la granda tabulo kie oni en multaj lingvoj kaj per simplaj vortoj konatiĝas kun Esperanto. Sekvas salonoj plenaj je titoloj pri kaj en Esperanto, ŝaranketoj plenaj je diversaj kolektoj - afiŝoj, flagetoj, poŝtmarkoj, glumarkoj, insignoj, kalendaroj, bildkartoj - sendube - oni povas trovi ĉi tie almenaŭ po unu ekzemplo de ĉio iam verkita, eldonita, presita, farita, desegnita aŭ mi-ne-scias-kioita en aŭ pri Esperanto. Ventumilo kun Emotivo! Malplena 0,33 litra sukuko kun esperantlingva nomo (Mirinda aŭ io simila, mi ne rememoras plu)! Kelkaj aĵoj eĉ lime de bona gusto, sed pri gustoj oni ne diskutas, ĉu?

Kaj en la lasta salono ankoraŭ kelkaj bustoj, modelo de Esperanto monumento en Linz kaj multaj unikaj kaj evidente altvalorej fotoj kaj dokumentoj. Finfine dika, konstante malfermata libro, plene je impresoj de vizitintoj el la tuta mondo.

Esperanto muzeo estas plena je diversaj propagandiloj en la diversaj lingvoj, sed estas bedaŭrinde ke ekz. esperantlingvan prospekton pri Vieno aŭ pitoreskajn E-motivajn bildkartojn oni povas trovi nur en la Muzeo. Ĉu ili ne estas ismaniere kaŝitaj por ordinaraĵneinformitaj homoj? Ĉu oni vere devas iri al la Muzeo por aĉeti bildkarton aŭ glumarkon? Tamen jes, diras sinjoro Merz, ĉar aliaj vendejoj postulas procenton kaj ekz. tiujn bildkartojn oni ne povas presi en tiom granda kvanto por ke oni permesu sin la lukson vendi ilin aliloke. Bedaŭrinde, pensas mi, ĉar nevendata signifas neaĉetata kaj ĉio estas parto de propagando kaj eventuala fonto de enspezoj.

Forlasante tiun ĉi unikan kolektajn, kiu ne impresis min malpli ol aliaj (sed pli) mondkonataj muzeoj je kiuj Vieno abundas, la unuan fojon mi sentis min imaniere kulpa antaŭ la resto de la mondo. Nia mondo disŝirata inter multaj brulantaj problemoj, nia mondo batalema, militanta, pacnekapabla, malsatanta... La lingvoproblemo tamen ŝajnas la plej solvebla. Se ni ĉiuj...

Ke mi koncentriĝu, kelkaj ideoj jam kristaliĝetas en mia kapo...

Sanja Bokulić

.....

#### Korespondanto de KEL

Kroacia Esperanto-Ligo komencis eldonadi monatan bultenon. Ĝis nun oni eldonis du numeroj (0-an kaj 1-an). La korespondanto de tiu bulteno el Rijeka estas Barbara Stanković. Ŝi devas ĉiun monaton ĝis la 20-a sendi al KEL en Zagreb informojn pri la aktivecoj de Esperantistoj en Rijeka.

R.Š.



# P L I D A

## ESPERANTLINGVA

### T E K S T O

**HELIKO - 3-a jaro, N-ro 10, Decembro 1984, ampleksa  
3-monata gazeto de la Komunuma organizajo Rijeka**

47-paĝa Heliko N-ro 10, impresas per sia riĉa informa enhavo, bonvenas kaj por la novuloj kaj por la veteranoj, kiuj ne havas okazon rekte kunagi en la movado.

Kvankam la informoj pri la okazintaj kongresoj kaj renkontiĝoj aperas en ĉiu movada informilo, tamen mi ŝatas legi tiajn artikolojn, ĉar ĉiu el ili traktas la okazaĵon laŭ sia specifa maniero kaj prilumas alian flankon de la eventoj.

Denove la plumo de Rado Ŝkalamera plej senlacis. Lia ampleksa artikolo "Kiom da libroj?" regas nin per pluraj faktoj pri la stato de eldonado de Esperantaj libroj, bibliotekoj kaj gazetoj - ĝis nun tre malmulte konataj. Kaj la rimarko pri la multkosteco de la E-libro devigas nin orientigi al la bibliotekoj de E-societoj kaj grupoj, kiuj regule havigu la novajn eldonaĵojn, ĉar por unuopulo, ĉe la nuna inflacia stato, la aĉeto de E-libro iĝas lukso. Sed, ĉu la esperantistoj sufiĉe uzas la librojn el la

